

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 16.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —  
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso  
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

B. TITTL:

## KONTRAŬ LA BOLŜEVISMO.

La batalo en la ĉeĥoslovaka social-demokrata partio, kiun kaŭzis parto da ĝiaj membroj proklamantaj tendencojn bolŝevistajn, kaŭzis la disfalon de nenatura koalicia registaro agrarie socialista — de tiu registaro, kiun kontraŭstaris la burĝaj partioj per akra opozicio, kaj kiu kaŭze de tio estis subtenata en la parlamento nur per negrava kaj necerta majorito. Sufiĉis subita interna krizo de la koalicio por fali la ministerian kabineton kaj tial la krizo de la social-demokrata partio estis samtempe krizo de la registaro.

Nia politika situacio iĝis tiel komplikita, ke oni ne povis trovi alian vojon el la ĥaoso, ol krei provizoran ministraron de oficistoj-fakuloj. Ke ĝi signifas krizon de la demokratio kaj de la parlamentarisma sistemo, estas evidente. Sed estas ankaŭ certe, ke tiu ĉi provizora aranĝo estis absolute necesa por fortigi la ordon en la respubliko, ĉar juŝ kaŭze de la sovaĝaj luktoj interne de la social-demokrata partio fortiĝis la destruktivaj elementoj tiom, ke tio komencis vekti maltrankvilon de la ordamaj ŝtatanoj. Kaj jen povas helpi kun sukceso nur tiu ministraro, kiu dependas de neniu politika partio. Kiel oni scias el la programa deklaro de la nova ministraro, esprimita pere de la nova ĉefministro J. Černý, la celo fortigi leĝan ordon, estos la ĉefa gvidanto de la provizora registraro.

Ke la nova registaro volas serioze plenumi ĉi tiun ĉefan parton de sia programo, tion pruvas la laste faritaj aranĝoj en Slovakio, en tiu parto de la respubliko, kiu fariĝis hejmo de magiaraj propagandistoj de bolŝevismo kaj de kie venis danĝera infekto por la tuta respubliko. La nova slovakia ministro Dro. Mičura ordonis forveturigi el Slovakio en ilian patrolandon ĉiuj magiarajn kaj aŭstriaajn propagandist-

ojn de bolŝevismo, kaj de tiu ĉi decido ne detenis lin eĉ la ĝenerala striko, proklamita de la bolŝevistaj partianoj en Bratislava kaj en kelkaj aliaj slovakiaj urboj. La striko finiĝis sensukcese post kelkaj tagoj, ĉar pli granda parto de laboristoj ekkomprenis, ke oni postulas de ili bataladon por fremdaj interesoj kaj la ministro Mičura daŭrigas sian ekstermigan batalon kontraŭ la fremdlandaj bolŝevistoj. Tiel okazis en Bratislava (9. X.) polica traserĉo gvidata de la ministeria sekretario, Dro. Herr, per kiu oni kun surprizo konstatis, ke la monaĥejo de »Kompatemaj fratoj« estas rifuĝejo de 75 individuoj tre danĝeraj al la ŝtato. Inter la arestitoj estas la iama komandanto de Budapeŝt teroristo Ujfalysz, kiu en la lastjaraj tumultoj antaŭ la budapeŝta parlamento lasis mortpafi preskaŭ 200 personojn kaj pri kiu oni diras, ke li partoprenis la mortigon de la cara familio en Jekatĕrinburk. Arestitaj ankaŭ estis Istvan Molnár, redaktoro de la bolŝevista gaezto »Népszava«, ĉefo de terorista bando kaj popola komisario Szalay, gvidanto de budapeŝtaj anarkiistoj Wiber k. a.

La fremdlandaj bolŝevistoj estos ekzilitaj kaj el la monaĥejo de »Kompatemaj fratoj« oni faros hospitalon. Estas videble, ke en Ĉeĥoslovakio komencas akra batalo kontraŭbolŝevista. Kontraŭ la bolŝevistoj batalas ne nur la registaro, sed ĉefe la oficiala social-demokrata partio, kiu senkomplete eksigas siajn membrojn, kiuj estas amikoj de bolŝevismo kaj de la III. Internaciano. Kaj jam nun oni povas diri, ke la bolŝevismo en Ĉeĥoslovakio malsukcesis. Tion cetare pruvas ankaŭ la en Praha okazinta (28.—30. sept.) kongreso de t. n. »Marksisma maldekstro de ĉeĥoslovakia soc. dem. partio«, kiu tre embarase evitis la aliĝon al la III. Internaciano, kontraŭe, ĝiaj multaj membroj deklaris, ke ili estas nek bolŝevistoj nek komunistoj.

En Ĉeĥoslovakio, ĉefe en Bohemio kaj Moravio, estas tre malbona kampo por bolŝevismo, kiu mem trovas partianojn nur inter homoj tro idealaj, forgesantaj ke la homoj ne estas kaj neniam estos senprofitaj anĝeloj, aŭ inter popolo neklera, kiu lasas sin allogi per la promesoj de pli feliĉa vivo. La potenca protesto kontraŭ la balŝevistaj tendencoj, kiu nun aŭdiĝas de la ĉeĥoslovaka laboristaro el ĉiuj partoj de la respubliko, garantias la evoluon de la respubliko laŭ natura demokrata vojo.

## NACIA VIVO

F. V. KREJČÍ:

### LA ĈEĤA NACIO KAJ ĜIA HISTORIO.

De post antikvega epoko loĝas la ĉeĥa nacio en riverregionoj de Elbo, Moldavo, Moravo kaj Vaho. La konata legendo pri la praavo Ĉeĥ kiu laŭdire alkondukis sian genton tien-ĉi ĉirkaŭ 600 jarojn post Kristo, ne respondas al la nuna scienca esplorado.

Nenio preciza ankaŭ estas konata pri tio, kio okazis en Ĉeĥio kaj Moravio antaŭ la alveno de nia slava gento; la rakontoj pri Bojoj kaj Markomanoj estas tute negarantiitaj kaj sekve ni povas diri, ke nur la ĉeĥa nacio kreis la historion de tiuj ĉi landoj, aŭ alie dirite, ke ĝi estas ilia historia nacio.

Longe certe daŭris, antaŭ ol la slavaj gentoj, ekloĝintaj en tiuj ĉi landoj, formis nacio, tio estas antaŭ ol la princoj sur Vyšehrad (kastelo en Praha) regantaj komence nur malgrandan teritorion de la centra Ĉeĥio, sukcesis unuigi ĉiujn ceterajn gentojn inter la montaroj Krkonoŝe, Rudohoří kaj Sumava. Sed samtempe kreiĝis dua centro sur la malsupa fluo de Moravo, sekve de kio jam de post pratempo kreiĝas diferenco inter ambaŭ landoj; tie ĉi naskiĝas ĉirkaŭ la jaro 800 post Kristo la potenca »regno de granda Moravio«, kiun regas la princoj sur Velehrad kaj kiu entenas ankaŭ la parencon loĝantaron sub Tatra montaro, la estontajn Slovakojn en norda Hungario. Tiun ĉi regnon, nomitan regnon de Svatopluk, detruis Magiaroj, kiam ili invadis (894) en Hungarion, kaj de post tiu tempo la granda Moravio perdas sian superecon, la subatraj gentoj estas forŝiritaj de ĝi kaj la pezopunkto de la tuta nacio estas transportata por ĉiam al Praha. La ĉeĥa princolando tiutempe estas ankoraŭ regno malgranda, en komparo kun okcidenta Eŭropo, malfruiĝinta kaj sekve

grave minacata de najbareco de la granda regno germana. Ĝi tamen savas sin de tiu danĝero kaj de la pereco, kiu trafis pli norde la Slavojn sur Elbo, tiamaniere, ke ĝi ĝustatempe akceptas la kristanecon kaj troviĝas en dependa rilato al germana regno, el kio ĝi tamen baldaŭ leviĝas al preskaŭ plena sendependeco kaj povo, per kiu ĝi superas iam eĉ ĉiujn germanajn ŝtatojn.

La unuaj ĉeĥaj regantoj el enlanda dinastio de Přemysl-idoj portas unue princon titolon, sed de post la duono de 13a jarcento ili akiras la reĝan titolon kaj la ĉeĥa lando nomiĝas reĝlando. Ili klopodas disvastigi sian povon super najbarajn landojn tiel, ke Ĉeĥio fariĝas kerno de la tuta grupo de landoj, eĉ en kelkaj epokoj la plej potenca ŝtata formo de la tuta centro Eŭropo. Komence la atento de la ĉeĥaj regnestroj estis turnita al Polio, kaj en kelkaj epokoj ŝajnis jam, ke la vojoj de tiuj ĉi du frataj slavaj nacioj unuiĝos, sed la sorto tamen disigis ilin. Tiom pli forte malkaŝas sin en sekvanta ĉeĥa historio la tendenco celanta al Danubo.

Reĝo Přemysl II. (ankaŭ nomata Otokar) fondas en direkto trans Alpoj grandan regnon, kiu vekas la envion de germanaj regnestroj. Rudolf Habsburk, elektita germana reĝo, ekbatalas pro tio kun Přemysl, kiu estas venkita (1278); super la kadavro de la ĉeĥa reĝo la habsburga dinastio atingas la posedon de Aŭstrio kaj fondas tie ĉi por longaj periodoj sian potencon. Jam la filo de Přemysl, Venceslao II. provas ree fondi grandan regnon ĉeĥo-hungario-polan, sed lia tro frua morto kaj la ne atendita mrigigo de lia filo Venceslav III. (1306) vanigas tiujn ĉi grandamplksajn projektojn. Tiel estingiĝas ankaŭ la unua kaj sola enlanda dinastio ĉeĥa, sed eĉ sub reĝoj el fremda sango la ĉeĥa ŝtato evoluas plue al granda potenco kaj gloro. Karlo IV. el luksemburga dinastio, kiu estas samtempe germana imperiestro, estras el Praha grandan regnon, kiu etendiĝas malproksimen en norda direkto en la nunan Prusion, kaj faras el Praha plej belan kaj plej grandan urbon de la tuta, centra Eŭropo.

Se ni tralegas la ĉeĥan historion de tiu epoko, ni estas ĉiam devigataj rememorigi al ni nomojn de reĝoj; kontraŭe tre malmulte ni scias pri la ĉeĥa popolo mem, pri ĝia vivo, spirito kaj oponio. Tio estis ja en mezepoko, en tempo feŭda, kiam anstataŭ nacio iniciate agis sole regnestroj kaj nobelaro, dum la milionoj de popolo vivis en muta obeemo kaj servuteco, formante sennomajn kaj senrajtajn amasojn. Tiel estis en la tuta Eŭropo.

Sed ĝuste en Bodemio ekestas post la jaro 1400 io, kion la tiamana mondo tute ne ko-

nis: la nacio mem suriras la scenejon de historio kaj ekprenas sian destinon, per propraj manoj. Tio estas jena glora kaj multsignifa epoko de ĉeĥa historio, kiun ni nomas husana (husida) epoko. Gviditaj de dezirego reformi la degenerintan eklezion kaj komprenante la kristanan doktrinon en ĝia tuta pureco, niaj autauloj senhezite sekvas Johanon Hus kaj ceterajn predikantojn de tiu ĉi purigemo de kredo kaj moroj. Kaj kiam majstro Johano Hus estas brulmortigita kiel herezulo en Konstanco la 6an de julio 1415, ili sentas tion kiel maljustecon kaj malhonoron de la tuta nacio kaj opozicias bravege kontraŭ la roma eklezio kaj kontraŭ le perforta kaj ruza reĝo Sigismundo, filo de Karolo IV., rifuzante lian pretendon al ĉeĥa trono. Dum dekkvinjara milito la ĉeĥa popolo rezistas sub la glora komando de Johano Žižka el Trocnov kaj de Prokop Holý al atakoj de papanaj armeoj kunvokitaj el la tuta Eŭropo kaj jen nia ĉeĥoslovaka nacio staras en zenito de sia forto, kvankam neniu reĝo estras ĝin. La organizo de Taboranoj (Taboritoj, radikala partio husana) estas ĉe ni Ĉeĥoslovakoj la unua ekzemplo de demokratio, sed la nobelaro rigardas tion kun malamo kaj kiam ĝi unuigite kun la burĝaro venkas la lastajn restojn de Taboranoj en la fatala batalo apud Lipany (1434), la povo de la popolo en Ĉeĥio estas rompita por longa epoko kaj le gvidado de la historio ree troviĝas en manoj de reĝoj kaj nobelaro.

Sub la husana reĝo Georgo el Poděbrady (1458—1471) staras la ĉeĥa ŝtato ankoraŭ en plena forto, sed malprosperas poste en senenergiaj manoj de reĝoj el pola dinastio Jagielona kaj la husana spirito enkorpiĝinta en kredokonfesion nomitan utrakvista, ĉiam pli kaj pli malfortiĝas. Kaj tiel, kiam en batalo kun Turkoj apud Moháč (1526) la lasta Jagielonano Ludoviko II. pereas, sufiĉas la intrigo de kelkaj nobeloj, ke sur la ĉeĥan tronon supreniru Ferdinando Habsburga, aŭstria arĥiduko; ĉar li estas samtempe elektita hungario reĝo, okazas la daŭra unuigo de tiuj ĉi tri grupoj de landoj: ĉeĥa, hungaria kaj aŭstria. La ĉeĥa ŝtato konservis eĉ en tiu ĉi nova situacio sian plenan memstarecon kaj estis dum jarcentoj la ĉefa fonto de la povo de Habsburganoj; ĝis ĉirkaŭ la jaro 1600 restas Praha ilia rezidenco.

En tiu sama tempo ekestis la religia reformacio ankaŭ en Germanio kaj la katolikismo kun la protestantismo estas konfliktontaj. La Habsburganoj estas la ĉefa apogo de la katolika eklezio kaj la husana konvinko de la ĉeĥa nacio estas

tial grava malhelpo por iliaj celoj. Romo kaj Vieno penas, ke la povo de nia nacio estu rompita. Kvankam Ferdinando II., post sia elekto ĵuris, ke li konservos ĉiujn liberecojn de la lando, li kaj liaj posteuloj klopodas pri la plialtigo de la reĝa povo malprofite por la landaj regantaj klasoj kaj al nekatolikoj okazas gravaj maljustaĵoj. Kiam la ĉeĥaj nobeloj en 1618 per elfeto de imperiestraj landestroj el fenestro de kastelo de Praha komencas ribelon kontraŭ Ferdinando III., ĉi tiu ribelo estas en sango subpremata en batalo sur Bílá Hora la 8an de novembro 1620 kaj 27 ĉefoj de ribelo estas senkapigitaj sur la Malnovurba placo en Praha. La ĉeĥa popolo sklavigita de la nobelaro kaj humiligita al amaso da senrajtaj servutuloj, ne havante tial veran intereson pri la destino de la nacio rigardas inerte tiun ĉi kolosan katastrofon. Certe, eĉ post ĝi la ĉeĥa ŝtato laŭ formo ne ĉesas ekzisti, efektive tamen Bohemio de post tiu tempo estas regata el Vieno, la germana restaĵo de aŭstria dinastio, okupita de fremda nobelaro kaj la aŭtoĥtonaj nobeloj estas devigitaj forlasi la patrujon, se ili ne konformiĝis al imperiestro en katolika kredo. Tiu ĉi religio estas perforte altrudata al nacio, kiu dum du jarcentoj staris ekster la roma eklezio; tiu perforto de la menso estas plej grava maljusteco, kiu iam ajn estis farita al iu nacio.

Dum du sekvantaj jarcentoj (1620—1820) la ĉeĥa nacio ne havas sian propran historion, ĝi vegetas en plej profunda dekadenco kiel nura parto de habsburga imperio, sen la vera nacia konscio, sen ĉefoj kaj sen literaturo. En oficejoj kaj lernejoj ekregas la germana lingvo tiel, ke sub imperiestrino Mario Terezo (1740—1780) kaj Josefo II. (1780—1790) jam ŝajnas, ke estas al ni Ĉeĥoj destinite perdi ankaŭ la lingvon kaj kunflui kun la aliaj nacioj de tiu ĉi regno en unu Aŭstrion regotan el viena centro per germana spirito kaj lingvo. Sed la historio de la mondo felicokaze ne permesas tion, tuta Eŭropo komenciĝas ĵus en tiu epoko liberiĝi de ĉiu malnova subpremo, venas la jaroj de la granda franca revolucio kaj sub la reviviganta spiro de liberigantaj ideoj el eŭropa okcidento komenciĝas en Bahemio la nacia renaskiĝo. Ĝi estas laboro de verkistoj kaj sciencistoj kun Dobrovský kaj Jungmann en frunto kaj oni povas diri, ke per la libro la ĉeĥa nacio estas vekita ĉirkaŭ la jaro 1800 al nova vivo. Certe, ĝia politika situacio ne pliboniĝas, male, neniam estis la premado de Vieno pli kruela ol dum la unua duono de la 19a jarcento. Sed de post la revolucia jaro 1848 ankaŭ nia ĉeĥa

nacio komencas penadi pri la politika liberigo kaj gvidata de Palacký, Havlíček kaj Rieger ĝi opozas kontraŭ la viena centralismo (tio estas la celado al unuigita Aŭstrio regota el Vieno) la ideon de federalismo t. e. la divido de la imperio laŭ grupoj de landoj aŭ nacioj. Ĉiam pli klare ĝi konsciigas pri sia rajto je propra aŭtonomia ŝtato apogante sin sur gloro kaj povo de la ĉeĥa ŝtato en historio (historia ŝtata rajto). Sed la cirkonstancoj estis malfavoraj al tiu ĉi ĉeĥa tendenco. Dum oni plenumis al Magiaroj en jaro 1876 la postulon de ilia propra ŝtato kaj sekve de tio la habsburga monarkio estis dividita en du ŝtatojn (dualismo) ni Ĉeĥoj estis simple enfakigitaj en la nehungarian parton, kontraŭnaturan konglomeraton de landoj kaj nacioj, kiu ne havis eĉ nomon kaj malsolide ligis naciojn sub jugo de germana superregado, same kiel la Slovakoj en Hungario estis donitaj kiel viktimo al plej aroganta arbitro magiara.

Kaj tiel dum la pasintaj kvindek jaroj nia ĉeĥa nacio, kvankam ĝi en ĉiuj fakoj de kulturo kaj laboro kuratingis kion ĝi estis preterlasinta en tempo de dekadenco, kaj kvankam ĝi estis la plej progresinta nacio de la tuta aŭstrio-hungaria ŝtatarupo, ĝi multe suferis sub tiu ĉi subpremado kaj sub neebleco decidi mem pri siaj aferoj. Fine la tutmonda milito alportis ankaŭ la decidan ŝanĝon en nia nacia sorto. Dum la militaj okazoj faris sin ŝata en tuta mondo la principo, ke neniu nacio devas esti estonte regata de alia nacio, ke ĉiu havas la rajton de memdestino (la ŝtata rajto natura) kaj nia nacia problemo ekinteresis tutan Eŭropon kaj la tuta mondo estis devigata okupiĝi pri ni. Ni ne estas plu unu el germanaj nacioj loĝanta en kelkaj landoj en aŭstrio-hungaria monarkio, hodiaŭ ni formas kun Slovakoj unuigitan nacion dekmilionan, kiu fondis sian propran ŝtaton sur plej larĝa bazo popola.

Kaj tiel ni ĝisvivis tion, kio ŝajnis al niaj avoj kaj patroj sonĝo malfacile efektivebla. Rebonigitaj estos la sekvoj de la katastrofo sur Bílá Hora; liberaj ni eniris ree en teron de nova, espereble pli feliĉa Eŭropo kaj ni volas ree kiel niaj husitaj antaŭuloj stari en frunto de la homa progreso. Tradukis Rudof Fridrich.

**Fremdlandoj gazetistoj laŭdezire ricevos de nia redakcio, aŭ de la »Sekcio por ekonomia kaj politika informado de la Ministerio por eksterlandaj aferoj« tute senpage notojn kaj raportojn pri Ĉeĥoslovakio.**

La Progreso.

A. KLIMAS, red. de »Darbas«.  
(Kaŭnas-Litovio.)

## EL LA VIVO DE LITOVIO.

En tiu ĉi artikolo mi priskribos nur plej gravajn politikajn momentojn de la vivo en Litovio.

Litovio, kiel oni scias, estas unu el novaj renaskiĝintaj ŝtatoj apud Balta maro. Litovio tre suferis pro tiu ĉi granda mondmilito. De 1914 jaro Litovio estis la areno por la bataloj: de unu flanko — Rusoj, de la alia — Germanoj. Grandaj rusaj kaj germanaj armeoj ne unu fojon trapasis tutan teritorion de Litovio, restigante ĉie la signojn de la detruado.

Fine en 1915 jaro la Germanoj okupis tutan Litovion kaj estis ĝis 1918 j., kiam laŭ paca kontrakto ili estis devigitaj forlasi Litovion. Dum tiuj tri jaroj por Litoviaj loĝantoj estis tre malfacilaj tempoj. Ne parolante jam pri ĉiuj aliaj malfacilaĵoj de milita tempo, germana militista estraro malpermesis skribi kaj sendi la leterojn en litova lingvo. Litovaj gazetoj estis malpermesitaj. Libera veturado de loĝantoj el unu distrikto en la alian ankaŭ estis malpermesita. Nur pli malfrue la Germanoj mem komencis eldoni en Kaŭnas (Kovno) sian gazeton en litova lingvo (»Dabartis«). En tiu ĉi gazeto oni laŭdis nur germanan kajzeron kaj germanan kulturon. Sed la loĝantaro rigardis la Germanojn tre ĉagrenaj kaj malkontente.

Iom pli malfrue estis permesite en Vilnius (Vilno) eldoni litovan gazeton »Lietuvos Aidas« (Eho de Litovio). Pli poste povis eliri ankaŭ aliaj litovaj gazetoj.

En 1918 jaro, kiam la Germanoj devis forlasi Litovion, aperis por Litovio nova danĝero — rusaj bolŝevikoj. Je la fino de 1918 la Rusoj alproksimiĝis al litova ĉefurbo Vilnius. En decembro de tiu ĉi jaro estis ĵus formiĝinta unua ministraro, t. e. unua registaro de renaskiĝinta Litovio. Tiu ĉi registaro tiam ne havis ankoraŭ sian armeon, kiu povus defendi la landon. Estis tiam nur 30 (tridek) soldatoj, volontuloj, kiuj ne povis prezenti sufiĉan potencon. Kaŭze de tio Litovia registaro estis devigita forlasi Vilnon kaj transloĝiĝi en alian litovan urbon, t. e. en Kaŭnas, kie la unua tasko estis formi litovan armeon por la defendo de litovia sendependeco. Al la alvoko de la registaro, eniri en la vicojn de la defendantoj de litovia sendependeco, aliĝis multaj volontuloj kaj oferantoj. Per tia maniero nerimarkite elkreskis la armeo, kiu danke, al sia kuraĝeco kaj la sindoneco povis haltigi invadantojn en Litovion Rusojn kaj Polojn.

Rusaj bolŝevikoj (komunistoj) pasigis en Vilnius cirkaŭ tri monatojn, ĝis la fino de aprilo (de 4./I. ĝis 28./III. 1919). Amstataŭ la Rusoj okupis Vilno en komenco de majo (1919) polaj legianoj, kiuj okupis ne nur la distrikton de Vilno, sed ankaŭ grandan parton de orienta Litovio kaj penis invadi en aliajn partojn de Litovio. Sub la influo de Francoj\*) estis tiam farita inter pola kaj litova armeo demarkacia linio. Sed la Poloj mem ne atentis tiun demarkacian linion; ili ĉiam memvole trairadis tiun ĉi linion kaj ree sub la gvidado de Francoj formadis novan linion, pli proksiman al centro de Litovio.

De 1919 jaro junio ĝis 1920 j. julio, kvankam oficiale ne estis la milito inter poloj kaj litovoj, tamen en multaj lokoj ofte okazis la bataletoj aŭ konfliktoj kun polaj soldatoj ĉe demarkacia (limdifina) linio.

Tiatempe en Litovio mem polaj bienposedantoj estis organizintaj sekretan militan organizacion, kies celo estis doni la informojn al pola registaro pri politika aŭ alia stato de Litovio. Multaj polaj spionoj estis enigintaj en litovan armeon. Tiu milita organizacio de Poloj kelkajn fojojn provis ribeli kontraŭ Litovia registaro, dezirante per tia maniero plifaciligi alvenon de pola armeo en Litovion. Sed nek unu fojon ili prosperis tiun ĉi taskon plenumi, ĉar Litovoj ĉiufoje malkovradis tiun ĉi komploton.

La Poloj ekvidinte, ke per direkta aŭ simpla maniero oni ne povas batali por la profito de Polio, ŝanĝis sian taktikon kaj decidis per alia maniero atingi tiun celon, nome — multaj el ili decidis konduki bolŝevismam propagandon, por ke ili havu »rajton« okupi tutan Litovion. Sed ankaŭ tiu ĉi pola mahinacio ne prosperis.

Dum tiu ĉi malfacila tempo litova armeo tiom plimultiĝis kaj plifortiĝis, ke povis kontraŭstari al diversaj kontraŭuloj kaj malamikoj de Litovia sendependeco.

En komenco de julio de nuna (1920) jaro eksplodis la milito inter Rusio kaj Polio. En tiu ĉi tempo la reprezentantoj de Litovio kondukis en Moskvo la intertraktadon pri la paco kun Rusio, kaj la 12-an de julio subskribis ambaŭ flankoj pacan kontrakton, laŭ kiu Rusio interalie promesdeviĝas doni al Litovio 3 milionojn da oraj rubloj kaj en sia teritorio proksime de Litovia limo 100.000 desetinojn da arbaro (1 des. = 1 hek.). Krom tio Rusio promesdeviĝis por siaj kostoj redoni ĉiujn havaĵojn, kiuj estis evakuitaj el Litovio dum la milito en Rusion. (Daŭrigo.)

\*) Tie ĉi oni parolas pri tiuj kelkaj Francoj, kiuj loĝas en Litovio kaj Polio. A. K.

## AL 28. OKTOBRO.

La rusa revolucio el la jaro 1917 liberigis min iom de la senkompara premo, sub kiu ni estis suferantaj de la komenco de la milito. Estis kunvokita la aŭstria parlamento kaj niaj gvidantoj kuraĝis tie proklami la postulon de la bohema memstato, komence iom kaŝita per la »aŭstria enkadriĝo«, sed tamen tiel klara, ke oni povis kompreni, ke nia nacio tute konsentas kun la penoj kaj eksterlanda laboro de prof. Masaryk kaj dro. Beneš, de tiuj proskribciuloj, kies nomoj estis elparolataj de la oficialaj gvidantoj aŭstriaaj nur kun aldonado de malbelaj kalumnioj kaj ofendoj.

Ĝis tiu ĉi revolucio ni vivis per la vivo de homoj senrajtaj, kiujn oni povis kiam ajn malliberigi kaj pendigi. Niaj gvidantoj en mallibereroj, viroj sur batalkampoj devigataj batali kontraŭ tiuj, al kiuj nin de pratempo altiris niaj simpatioj, hejme magiaraj soldatoj kaj malsato, tiu terura malsato, kiu faris el popolo aron da ftizuloj kaj nian tutan ekziston plentigis per unusola peno: satmanĝi. En tiu situacio ni vivis. Kaj la malsato faris la homojn bestoj kaj krimuloj. Kiam la malsato atingis plej altan gradon, oni prenis kie io estis. La malsato ofte pelis la homojn kontraŭ la kuglojn de soldataj armiloj. Tiel ekzemple okazis en Pardubice, kie la malsatuloj atakis vagonaron kaj estis mortpafitaj de alvokitaj magiaraj soldatoj. Tiel okazis en Plzeň, kie malsataj infanoj atakis bakistan veturilon kaj vico da ili estis mortpafita aŭ vundita de taĉmento de magiaraj soldatoj, komanditaj de germana oficiro.

La malsato nin turmentis, sed ne mortigis. Nin fortigis la espero, ke post tiu terura sufero alvenos hela tago, kiu al ni donos liberecon, ke venkos demokratio, kiu faros nin homoj liberaj. Kaj tiu tago venis. Venis la 28. oktobro 1918, kiam la estroj de la aŭstria monarkio konfesis sian malvenkon kaj nekapablon plue militi. »Paco! Ni devas esti liberaj!« Tiu devizo elparolita de neniu sed sentata de ĉiu Bohemo igis nin forĵeti ĉion, kio memorigis al ni la tricentjaran jugon. Ĉu oni iam povas forgesi tiun tagon, kiam ni komencis forĵetadi ĉion, kio anoncis, ke la glora Ĉeĥio estas vazalo de Aŭstrio: la bildojn de ĵurrompaj Habsburgoj kaj la dukapajn aŭstriaajn aglojn? Ĉu oni iam forgesos tiun tagon, kiu estas limo inter la epoko de sklaveco kaj epoko de la Libereco?

Ne, neniam! Ĝi ja forigis la batalon sur la Blanka Monto! Kaj tial vivu en nia memoro la 28. Oktobro!

## ĈEĤOSLOVAKIO.

**Prof. E. Denis** el Parizo, la konata amiko de Bohemoj kaj batalanto por ilia liberigo alvenos la 28. okt. al Praha por kelktaga restado.

**En la venonta monato** (novembro) oni festos en Bohemio 250-an datrevenon de la morto de Comenius. — Parto de nia novembra numero estos dediĉita al tiu ĉi nia glora samlandano. — Nia samideano kaj samlandano prof. F. V. Lorenz en S. Feliciano (Brazilio) eldonis en portugala traduko la konatan verkon de Comenius »Labirinto de la mondo« kaj »Paradizo de la koro«. Ĝi estas la unua portugala libro tradukita el bohema lingvo.

**Ĉeĥoslovakaj ambasadoroj** estas en jenaj landoj: Argentino (Buenos Aires), Belgio (Bruxelles), Brazilio (Rio de Janeiro), Bulgario (Sofia), Ĉinio (Peking), Danio (Kopenhagen), Francio (Paris), Italio (Roma, Kvirinal kaj Vatikano), Japanio (Tokio), Jugoslavio (Belgrad), Germanio (Berlin), Hungario (Pest), Holando (Haag), Polio (Warszawa), Aŭstrio (Wien), Rumanio (Bukaresti), Grekio (Athene), Hispanio (Madrid), Usono (Washington), Svedio (Stokholm), Svisio (Bern), Turkio (Constantinopolis), Britio (London).

La ŝtata buĝeto por la jaro 1920-21 estos aktiva: ĝi prezentas ĉirkaŭ 80 milionojn Kč da superresto. — La unuaj rekrutoj de la respubliko, asentitaj laŭ la nova defendkodo ekde joris la 12. okt. Parto de bohemiaj rekrutoj milit-servos en Slovakio kaj kontraŭe la Slovakioj deĵoros en urboj bohemiaj. — Oficiala popolsumigo en la tuta respubliko okazos en la jaro 1921, versimile en monato marto. — La iama ĉefministro Tuzar estis nomita ambasadoro por Berlino. — Laŭ la statistiko de l'oficejo por eksterlanda komerco, oni importis en Ĉeĥoslovakion en la jaro 1919 diversajn komercaĵojn el la tuta mondo en sumo da 4.788.827.413 Kč. Kontraŭe oni eksportis komercaĵojn en sumo da 5.010.093.562 Kč. — En Ĉeĥoslovakio estas 200 ŝuofabrikoj, kiuj povas produkti ĉiutage 50.000 paroj da ŝuoj. El ili estas 170 posedaĵo de ĉefaj kapitalistoj, 30 de germanaj. — Post disigo de soc. dem. partio havos la komunistoj en Ĉeĥoslovakio 18 deputitojn en la parlamento. — Dum la lastaj du monatoj (15. julio — 15. sept.) oni kondamnis 950 personojn pro milita akaparado.

## ESPERANTISMO

### XIII. Universala Esperanto-Kongreso 1921 en Praha — Ĉeĥoslovakio.

La 29an de septembro 1920 en la komitata kunveno de la: Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, Esperantista klubo kaj Rondeto de Esperantistinoj oni elektis jenan lokan porkongresan komitaton:

Prezidanto: Eiselt, eksgimnaziestro, vicprez.: 1. Kraus, magistrata oficestro, 2. Fino. Šupichová, instruistino. Generala sekretario: Pitlík, komercministeria komisario, sekretariino: Fino. Dlouhá, oficistino de ŝtataj fervojoj. Kasisto: Novák, horlogisto. Por la »Verda Stelo« estis elektita MUDr. Bischitzky.

Sekciestroj: 1. Financa: Hromada, oficisto, 2. propaganda: Bouška, urba oficisto, 3. presa: Weiner, redaktoro, 4. loĝiga: Fino. Moudrá, instruistino, 5. por distraĵoj: Fino. Hlavácková, instruistino, 6. aranĝa: Lukáš, studento de la universitato. Revizoroj: Dro. Kohout, landa ĉefkonsilanto kaj Vondruška, landa revidento.

Ĉiun korespondadon kaj aligojn oni sendu (por respondo respondkuponon aŭ afrakon en naciaj poŝtmarkoj) al: Augustin Pitlík, Praha III., Nerudova 40.

## DIVERSAĴOJ

**Internacia ekspozicio** de arkitekturo, konstruado kaj similaj industrioj okazos en Gent (Belgio) 14. aprilo — 16. junio 1921. Ĝi enhavos jenajn fakojn: Arkitekturo, materialo, aranĝado de la hejmo, malkaraj loĝejoj, higieno de la loĝejo, lumigado kaj varmigado, elektro en ĉiuseca uzado, ornama arto, luksa kaj simpla meblaro, komforto de la hejmo, broŝuroj, gazetoj, revuoj. Dum la daŭro de la ekspozicio okazos diversaj kongresoj, interalie de la entreprenistoj. Estas do dezirinde, ke la entreprenistoj parolantaj Esperanton partoprenu. La »Genta grupo esp.« estus feliĉa, se alilandaj samideanoj aranĝus tie sian fakan kongreson. Interesuloj sin turnu al so. H. Petiau, sekretario de la »Belga ligo esp.« 60. Bv. St. Liavin, Gent.

**Se vi intencas vojaĝi al Bruselo**, petu gvidlibron tra Bruselo ĉe la Senpaga Informoficejo (Bureau Officiel de Renseignements Gratuits pour Étrangers Place de la Bourse, Bruxelles).

**De la Esperantista Akademio** ni ricevis sciigon, ke so. R. de Saussure ne plu estas membro de la Akademio nek de la Lingva komitato. Samtempe ĝi petas senpagan sendadon de nia gazeto al ĉiuj ĝiaj membroj. (Ni tion volonte faros.)

**»La Esperanta Lingvisto«.** So. Stefano La Colla el Palermo, Via Felice Cavallotti 1. (Sicilia) intencas eldoni sub tiu ĉi titolo gazeton, kiu okupas sin sole per la lingvaj demandoj. Kiu sin interesas pri la afero, tiu sin turnu al li, samtempe sciigante siajn konsilojn kaj proponojn.

**Ĉeĥoslovakaj komercistoj** ne skribu en fremdlandon germane! Komerca entrepreno »Compania Ibérica« en New York sendis leteron, al unu bohema komercisto en Ĉes. Třebová el kiu ni citas: »...Se vi havas ian influon ĉe via nova registaro, proponu fari novan leĝon, per kiu la fakturoj adresitaj al fremdlando devas esti skribataj en via ŝtata lingvo kaj akompanataj per alilingva traduko, eble esperanta. Tiamaniere Ĉeĥoslovakio montros, ke ĝi havas sian propran lingvon kaj kiel moderna ŝtato, ke ĝi uzas Esperanton. Ni, kaj ĉiuj aliaj importistoj ricevas el via lando fakturojn ĝenerale en germana lingvo. Kvankam ni ne konas vian ŝtatan lingvon, ni certe ŝatas ĉiun ŝtatan, kiu povas montri sian propran lingvon, ĉar alie oni ĉi tie kredas, ke la popolo ne havas sufiĉan inteligentecon por uzi sian propran lingvon en la komerco. Por diri la veron, kelkaj raportistoj tie ĉi skribis, ke la lingvoj de la

novaj ŝtatoj en Eŭropo estas sur malalta nivelo, kaj ke ili estas uzataj nur de kamparanoj, sed ne por kulturo kaj komerco...»

**Japanaj samideanoj en Ĉeĥoslovakio.** So. Aitaro Yamanoj kaj lia lernanto de bohema kaj esp. lingvoj 16 jara Taró Iwasaki sciigis nin, ke ili baldaŭ venos en nian landon por kelk-jara restado inter ni. Por so. Iwasaki ni jam trovis okupon ĉe unu komercisto en Plzeň. So. Yamanoj intencas studi ĉe la universitato en Praha kaj li certe trovos varman akcepton ĉe la lokaj samideanoj. Li tradukis en japanan lingvon la konatan verkon de Masaryk »Ideály humanitny« kaj nun verkas lernolibron de la bohema lingvo por Japanoj, por kiu promesis skribi antaŭparolon so. Habrman, la unua ĉeĥosl. ministro de la nacia kulturo. Nuntempe so. Yamanoj instruas boheman lingvon (13 lernantoj) ĉe la komerca reallernejo en Yokohama. Boheman lingvon li ellernis de niaj legianoj.

»**Esperanto-Mitteilungen**«, la organo de la Ligo de germanlingvaj esp. soc. en Ĉeĥoslovakio instigas la germanlingvajn samideanojn partopreni kiel eble plej multnombre la XIII. kongreson por sin tie rimarkinde reprezenti. Tiu ĉi instigo devigas la Bohemojn kaj Slovakojn al plej intensa laboro porkongresa! Ili ŝparu por la vojaĝo, aranĝu plej multnombrajn kursojn kaj kolektu monon por la kongresa kaso. Nia devizo estu: Ĉion por sukceso de la XIII.! Ĉiu bohema kaj slovaka esperantisto havas la moralan devon partopreni! Legu ĉiam atente la oficialajn raportojn de la Loka kongresa komitato!

**Dum la XIII.** oni aranĝos ankaŭ nacivestan balon kaj la ĉeĥoslovakaj samideanoj havos tiel la plej bonan okazon fierigi per siaj regionaj naciaj kostumoj. Ni atentigas pri tio jam nun, ke oni zorgu ĝustatempe por la nacia kostumo. Ĉeĥoslovakio, la lando de belegaj naciaj kostumoj devas prezenti al la fremdaj samideanoj diversecon de la vestado de siaj loĝantoj. Sokoloj—samideanoj povos partopreni en sia unuformo, interkonsentante pri tio kun siaj lokaj sokolaj unuigoj.

**Kronjko.** Eĉ en tiu ĉi monato ne sendis al ni so. Hromada, la ĝen. sekretario de la »Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista« raporton pri la ŝtato de nia enlanda esp. movado. Tial ni ne havas la eblon prezenti la bildon de la nuna vivo en niaj organizaĵoj.

**Atentigo.** Pro numerojn ni sendas de nun nur post sendo de unu respokuponu aŭ 1 Kč.

ooo

## DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresio kostas 2.— Kč.)

**Praha VII.** (Ĉeĥoslovakio), Bělského 33, So. J. Kvarda korespondas per let. kaj. p. k.

**Král, Vinohrady** (Ĉeĥoslovakio), Brandlova ul. 19. — So. Pavel Vacek, studento deziras kores. per il. kartoj kaj let. kun ĉiuj landoj.

**Chrudim** (Ĉeĥoslovakio) No. 354-II. So. V. Gallat deziras interŝanĝi p. m., prefere kun fremdlandanoj.

**Dolany ap Klatovy** (Ĉeĥoslovakio). So. J. Kučera deziras karespondi kun fremdlandanoj.

**Osek u Rokycan 137** (Ĉeĥoslovakio). So. Fr. Černý deziras kores. per il. k. kaj kun gimnastikistoj de ĉiuj landoj. Certa respondo!

**Osek u Rokycan** (Ĉeĥoslovakio). So. Miloslav Hejl dez. koresp. per ilk., marko bildflanke kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Certa respondo!

**Tulánka, poŝto Kapušany**, župa Šaryšská (Ĉeĥoslovakio). So. Nikola Ilkovič, studento, deziras karesp. per let. kaj. p. k. (En la lasta numero estis falsa adreso!).

**Kroměříž** (Ĉeĥoslovakio), Jiráskova 123. — So. Otto Pokorný deziras koresp. kaj interŝanĝi markojn kaj gazetojn. Certa respondo!

**Zábřeh** (Moravio, Ĉeĥoslovakio) Sokolovna. — So. Jan Bittner deziras interŝanĝi il. pk. markojn bildflanke!

**Zábřeh** (Moravio, Ĉeĥoslovakio). Fino. Ant. Bittnerová dez. interŝanĝi il. pk. markojn bildflanke.

**Tokio** Kiobashi (Japanio) 3/X. Minamidawaracho. So. Aitaro Yamanoj serĉas junajn korespondantojn por siaj lernantoj de Esp.

**Tarasa-Barcelona** (Hispanio), Valle str. 9. So. Vincente Garcia — deziras koresp. kun ĉiuj landoj, resp. tuj.

**Shanghai** (Ĥinio), North Szechuen Rd., Sing-Wah School No. Y. 1780. »Shanghaja Esperanto-Asocio« serĉas korespondantojn por siaj glerntantoj.

**Omaha** (Nebrasca, U. S. A.). So. M. Sitera, 2721 SO, 13th. street, deziras korespondi per p. k. (sed ne kun germana ŝovinisto).

## Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.

(Při objednávce poštou nutno připočísti poštovné).

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný . . . . . Kč 7.50  
Slovník esperantsko-český, brož. . . . . Kč 5.—  
Časopis »La Progreso«, roč. 1918 . . . . . Kč 4.50  
Časopis »La Progreso«, roč. 1919 . . . . . Kč 6.—
- Kühnl: Úplná učebnice esperanta:  
a) vázaná v plátěném hřbetě . . . . . Kč 14.40  
b) vázaná v papíru . . . . . Kč 12.—  
c) celoplátěná vazba . . . . . Kč 16.40
- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper.:  
a) vázaný v plátěném hřbetě . . . . . Kč 21.60  
b) brožovaný . . . . . Kč 18.—  
c) celoplátěná vazba . . . . . Kč 24.—
- Vortoj de Zamenhof, na obyčej. papíře . . . . . Kč 4.50  
Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře . . . . . Kč 6.—  
Sherlock Holmes . . . . . Kč 4.50
- Výtah z Kotzina: Na obranu esper. . . . . Kč 2.40  
Gvidlibro tra Praha . . . . . Kč 3.60  
Klíč esperanta . . . . . Kč —.30  
Co je esperanto . . . . . Kč —.20  
Časopis Českých Esperantistů, ročníky I.—VIII., po . . . . . Kč 5.—
- Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo . . . . . Kč 12.50  
El proksima oriento . . . . . Kč 9.—

Ĉtete knihu známého autora Dr. St. Kamaryta:  
**O DVOJÍ PRAVDĚ**  
 V komisi administrace „La Progreso“ v Plzni.

**V**ia horloĝo iros  
 precize se vi ĝin donos por  
 rebonigi al



**Fr. Novák,**  
 horloĝisto en Praha.  
 Malé nám. 10.

Magazeno de horloĝoj  
 kaj juveloj. - Vendejo  
 de esper. signoj de  
 Esper. klubo en Praha.

**Preparu vin por la  
 XIII. Kongreso.**

Esperantajn  
 Insignojn, Flagetojn, Kravatpinglojn,  
 Insignojn de U. E. A., Manŝetbutonojn  
 liveras

**H. RÖHLICH, Gablonz a N.**  
 Wassergasse 7a. Postulu prezaron

En Vieno fondis niaj samideanoj asocion por la  
 produktado de luksaj ŝuoj sub jena adreso:

**Produktiva asocio  
 „ESPERANTO“**

fabrikado de specialaj luksaj ŝuoj en Vieno.  
 Al ĉiuj samideanoj ni rekomendas subtenon de  
 tiu-ĉi entrepreno.

Dopisnice s obrazem presidenta  
**T. G. MASARYKA**  
 vydala admin. „La Progreso“  
 kus 30 hal., 10 kusů 2.70 Kč, 100 kusů 24.— Kč.

Laŭ interkonsento kun la eldonantaro de

**ESPERANTA  
 FINNLANDO**

estas tiu bela kaj riĉe ilustrata gazeto  
 abonebla por Kč 24.— jare ĉe  
 Administracio de „La Progreso“  
 Plzeň Poděbradova 6.

Somero 1920 Ĵus aperis **2.-a eldono**  
**BĚS-a**

**ADRESARO**  
 de l'Esperantistoj el ĉiuj landoj

Prezo: 7.50 Kč  
 (fremdlande: 1.50 Fr. sv., pagebla papermone,  
 poŝtmarke aŭ respondkuponoj).  
 Rabato por opaj mendoj.

**BOHEMA ESPERANTO-SERVO**  
 Moravany, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, Eŭropo.

**Japonský čechofil**

Aitaro Yamanoi, jediný japonský tlumočník  
 češtiny v Tokiu, podává veškeré zprávy o Japon-  
 sku za účelem japonsko-českého sblížení. (2 od-  
 povědky [Coupon-réponse] přiložte k dopisu).  
 Adresa: 3/X. Minamiodawaracho, Kiobashi, Tokio.

**Vešk. informace o Esperantu**

přináší brožurka J. ŠUPICHOVÉ, kterou vydal  
 „Kroužek esperantistek“ v Praze:

**Učte se Esperantu**

Cena 1 výtisku poštou 60 h, při větší objednávce  
 sleva. Objednávky vyřizuje sekretářka Kroužku  
 sl. Sidonie Dlouhá v Praze, Wilsonovo nádraží.

**Filatelistoj!** Mi povas liveri Franc. kolon.  
 markojn en la sekv. prezo:  
 25 diversaj de Fr. Kolonioj . . . . . 10 Kč  
 50 . . . . . 22 „  
 Ankaŭ „esperantaj glumarkoj estas rice-  
 vebaj prezo de 100 pecoj . . . . . 4 „  
 Afrankajo **Alojzo Janza,** Žilina,  
 malsame. Poŝtŝtako 26.